

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Studo pri
matematiko
kaj scienco

Aviada
terminaro

TURISMO

Lagoj de Plitvice

La nacia parko en Kroatio

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel:+32 3 234 34 00
Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:
81 EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne brem-

sas la disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj





Estimataj gelegantoj,

Eble vi rimarkis, ke neniam en nia revuo mankas artikoloj pri ekonomio. Ne malofte tiu ĉi rubriko estas eĉ la plej ampleksa. Tio ne estas hazardo; fervoron de aŭtoroj pri ekonomio ni dankas ankaŭ al favoro de l' koncerna asocio Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) kaj ties multjara prezidanto, Franz Josef Braun. Krome estrarano de IKEF, Roland Rotsaert, estas redaktoro de nia rubriko. IKEF daŭre proponas al siaj membroj verki por MONATO, kun sukceso, kiel oni povas legi en la jarraporto de IKEF. Tie oni listigas sep membrojn de la fakgrupo, kiuj regule verkis por nia revuo en 2000. Sed la raporto atentigas: „Malgraŭ tiu laŭdinda agado ni devas konstati, ke por grandaj mondopartoj ankoraŭ ne estas kunlaborantoj por MONATO, kvankam loĝas IKEF-anoj tie.” Kaj la estraro aldonas: „Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke MONATO rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de MONATO” Tiu ĉi propono baziĝas sur la ekkono, ke kunlaboro utilas al ambaŭ, la fakgrupo kaj nia revuo. Ekonomiaj temoj nuntempe trovas pli kaj pli vastan intereson, nelaste pro la tutmondiĝo, kiu furoras jam de multaj jaroj, kaj pro la fakto, ke unu el la grandaj ekonomikaj sistemoj kolapsis: komunismo fiaskis kaj malaperis, sed por multaj ekskomunismaj landoj transiro al kapitalismo alportas multajn kaj grandajn problemojn. Do temoj por la rubriko certe ne elĉerpiĝos.

Sincere via Stefan Maul

leteroj	4
el mia vidpunkto	5
- Drako korupteco	
ekonomio	6
- ĈINIO: Dekono de la familioj baldaŭ aĉetos aŭton ▶	
- KONGO: Impostoj nervozigas la komercistojn	
moderna vivo	7
- LITOVIO: Kiel sumojn konsumi ...	
- Post domaĝo ... omaĝo	
- NEDERLANDO: Poezio enRETigita	
- Notoj: Televida labirinto	
medio	8
- LITOVIO: Pinoj mortas	
- Teo sur ... plaĝo	
- Fumado aŭ sano	
- Lupreneblaj kristnaskaj arboj	
scienco	9
- MATEMATIKO: Komparo de instrumentoj ▶	
- BRITIO: Deprimo	
- Geno de memmortigo trovita	
- GEOLOGIO: Formikoj en sukceso de 92 megajaroj	
turismo	12
- KROATIO: Lagoj de Plitvice (Kovrilo)	
lingvo	14
- TERMINOLOGIO: Cele al aviada terminaro	
arto	16
- La husaro-aeronaŭto ▶	
- DISKOJ: Brue sed neskmale	
libroj	17
informoj de l' MONATO	21
ŝerco & satiro	22



Ekkonscianta signo

Ni ne forgesu la nediritan aliancon de trompadatoj kaj trompadantoj. Se la unuaj konsciiĝas, la duaĵ ne plu marŝigas. Sed ofte marŝantoj blindiĝas por ne perdi sian spiritan patron. En la konsciiĝanta fono mi bedaŭris nenion vidi en nia gazeto pri Millan-a evento okazinte fine de junio 2000, kvankam mi sendis artikoleon al la redaktoro de la koncerna rubriko. En tiu franca urbo eble cent mil homoj amasiĝis en la stratoj protestante kontraŭ ununura pensado en la mondiĝanta merkato. Ekkonscianta signo.

Michel MARKO, Francio

Burleska tribunalo

Mi ne certas, ĉu la komentoj de Igarasi Takeo pri la „Internacia tribunalo de virinoj pri militkrimoj” (MONATO 2001/4, p. 6) ŝokas aŭ simple deprimas min. Estas tro facilanime, senvalorigi kiel „burleskaĵon” aŭ „neaŭtentikaĵojn” tiajn klopodojn de „internacia tribunalo” prilumi pasintajn krimojn. Kaj malfacilas eviti la konkludon, ke tiel taksas Igarasi ĉefe pro tio, ke al li malkomfortas la ideo, ke multo en la akuzoj pri militkrimoj tamen veras. Jes ja en multaj landoj kaj epokoj okazis teruraĵoj, sed ne ĉie samgrade, kaj bagateligi iujn krimojn pretekste, ke ili ne estis unikaj, ne estas bona vojo al pli justa kaj homrespekta mondo. Ankaŭ mistifis min en tiu afero la komparo kun kortumo en mezepoka Eŭropo, ĉar tiu internacia tribunalo kunvokita de neregistara organizaĵo havas por mi malmulton mezepokecan kaj estas male tre moderna formo de defendo de homaj rajtoj. Kaj se Igarasi celas, ke tiu tribunalo estas mezepokeca ĉar burleska, tiam la eŭropanoj, kiuj iom fieras pri la longaj tradicioj de siaj landoj, rajtos siavice senti sin iel insultitaj.

Brian MOON, Luksemburgo

Nepardonebla prisilentado

Mi multe miris legante la artikolon „Ĉu vere burleskaĵo?” (MONATO, 2001/4, p. 6) pri japanaj militaj seks-sklavinoj. Krom la milde ironia titolo, verŝajne algluita de via redakcio, ŝajnas al mi strange ke homarana lingvo kiel Esperanto – kaj en esperanta revuo!!! – povas esti uzata tute senhonte por tiaj naciismaj fanfaronadoj. Ankaŭ se pasis „pli-ol-unu-duonjarcento” ekzistas krimoj, kiel la buĉado de Nankino en

Ĉinio aŭ la holokaŭsto en Eŭropo, kiuj ne povas kaj ne rajtas esti forgesataj, ĉar ili estas tro monstraj kaj ofendas tion kio la homo estas. Tio, kion la aziaj landoj riproĉas al Japanio, estas la volonta manko de tia memoro, kio estas granda signo de manko de respekto al homo. Ĝi videblas ankaŭ en la „silentaj” japanaj lernolibroj de historio kaj do, tre danĝere, en la edukado de la estontaj generacioj. Legante tiun artikolon mi rekonis la saman arogantan stilon de la eksĉefministro Mori, kiam li devis malvolonte ekspliki kial li trankvile „forĝesis” ĉesigi golfan ludadon kiel respekt-signo pro morto de samlandanoj. Kompreneble, el tia vidpunkto, kompare al la trankvila kaj senmemora golfa ludado de la ĉi-duonjarcenta Japanio, ĉio estas nur ĝena burleskaĵo!

Alessandra MADELLA, Italio

11 pripensindaĵoj

La reago de K. K. Eckstädt (MONATO, 2001/3, p. 8) estas interesa, ĉar tiel multaj legantoj de MONATO eble eklegos mian eseon (2001/1, p. 26-30) pro scivolemo aŭ pro objektiveco. Sed eble li ne tute komprenas, kio okazis en Jugoslavio kaj kial la Juĝejo de Hago postulas, ke la militkrimuloj, kiel Slobodan Milošević ks, sin prezentu respondeci pri siaj militkrimoj. Tamen, mi devas klarigi kelkajn aferojn: 1. Albanoj daŭre ne povas eniri Jugoslavion servize. 2. La origina nomo de Gjakova estas Djakovica. Ĝi ĉiam estis albana urbo kaj havas sian propran historion. 3. Mi ne asertis, ke serboj estas barbaroj kaj albanoj toleremaj. Nun estas klare, ke serbaj fipolitikistoj insidis la serban popolon engaĝiĝi en longan sanguman militon, eĉ kontraŭ aliaj slavaj popoloj. Nun estas ja en la manoj de serboj mem konvinki la aliajn, ne serbajn popolojn, ke la serboj ne plu sekvas la kriman politikon de la pasinteco. 4. Post tiuj nepriskribeblaj teruraĵoj, okazintaj en Kosovo dum la milito lasta, oni ne devas atendi, ke albanoj, kiuj perdis siajn gefilojn, geedzojn, gefratojn, gepatrojn ks, fariĝu tuj anĝeloj. Sed ne veras, ke ili detruis pli ol cent ortodoksajn preĝejojn. 5. La terojn de serboj neniu tuŝas, nek iliajn hejmojn. Ili mem timas pluloĝi tie pro teruraĵoj kaŭzintaj al albana popolo. Certe tia situacio ŝanĝiĝos, kaj Kosovo estos denove malfermita por ĉiuj siaj civitanoj, inkluzive serbojn. 6. Albanio ne avidas la ercojn de Kosovo, ĉar ĝi

mem estas sufiĉe riĉa je ili. 7. Universitato de Priština estis malfermita en la jaro 1968, danke al la longdaŭra strebado de tiea albana popolo kaj konforme al la tiama politiko de registaro, gvidata de Tito, por ekvilibrigi la interesojn de diversaj etnoj en Jugoslavio kaj por pruvi al la cetera mondo, ke Jugoslavio estas ja demokratia lando. Ĝi havis 30 000 studentojn, plejparte albanojn, kaj okupis la duan lokon en la tiama Jugoslavio. 8. Dufingro estas simbolo de popoloj, kiuj batalas por libero, dum la simbolo de dukapa nigra aglo sur ruĝa fono estas aŭtentika albana kaj ege signifa! 9. Mi ripetas, ke la Batalo en Kosovo-Kampo en la jaro 1389 estis granda milita renkontiĝo. en kiu partoprenis ankaŭ albanoj. Mi ripetas, ke necesas korekti la surskribojn serbajn, gravuritajn sur ŝtonoj en la muroj de la monumento pri Batalo en Kosovo-Kampo, ĉar ili estas tute misinformaj. Oni povas reskribi ankaŭ serbe, krom albane, kaj alilingve, sed spegulante la historian veron. 10. Serboj estis favore dungitaj en ŝtatoŝefoj. Tial albanoj estis devigataj sin okupi per privata entrepreno, vendejo, metiejoj, komerco ks. 11. UĈK (albana mallongigo de Armeo por Liberigo de Kosovo) neniam eksplodigis bombojn surstrate por mortigi senkulpajn homojn. Ĝi ekzekutis nur kunlaborantojn de la polico serba kaj klopodis protekti la loĝantaron de la atakoj senskrupulaj de serba armeo.

Bardhyl SELIMI, Albanio

(N.d.l.r.: La letero estas ege mallongigita. Krome, la originalon sekvas listo kaj priskribo de libroj pri la kosova historio.)

Ne jida, sed rusa

En la artikolo „Influo de la jida lingvo sur Esperanto” (MONATO 2001/3, p. 23) la aŭtoro lasis du frapajn preteratentaĵojn. Nome: ankaŭ en la rusa lingvo „respondi” signifas „esti proporcie, simetrie akordigita kun io”, mallaŭ opinio de la aŭtoro. Due: la vorto „nu” en la sama formo kaj kun la sama senco ekzistas ankaŭ en la rusa (Cherpillod eĉ ne mencias ĉi tion), kaj, plej verŝajne, Zamenhof ĝuste de la rusa enkondukis ĉi vorton en Esperanton, ne de la jida. Domaĝe, ke en la artikolo troviĝas neesploritaj faktoj. Ĉu eble enestas malĝustaĵoj koncerne ankaŭ aliajn lingvojn?

Jelena KATAJEVA, Rusio

Drako korupteco

Se nun oni persekutas koruptajn registrojn eĉ en Azio, kie tradicie ŝmirmono estas konsistiga parto de l' politika sistemo, ĉu ni povas esperi, ke baldaŭ ni vivos en mondo sen korupteco kaj subaĉeto? Atendi ion tian eble estas iluzio, tamen multiĝas signoj, ke homoj ne plu pretas akcepti tiun plagon rezignacie kiel ŝafoj.

Dum jardekoj en multaj aziaj landoj la regantaj klasoj senhonte ekspluatis siajn landojn, por riĉigi sin mem je kosto de malriĉa popolo. Politikistoj kaj altaj ŝtatoficistoj fraŭdis milionojn el ŝtataj kasoj, per ŝmirmono el komerco kaj industrio, per uzurpo de evoluhelpo ebligis luksan vivon al si mem kaj ofte al la tuta klano – ankaŭ nepotismo en multaj landoj estas normala fenomeno. Eksa indonezia diktatoro Suharto ekzemple dum 32-jara regado enkasigis miliardojn da usonaj dolaroj. Tajlandaj ministroj komence de l' 90aj jaroj malkaŝe regalis sin per altaj sumoj el siaj buĝetoj. Imelda Marcos, edzino de filipina diktatoro, fanfaronis pri sia giganta ŝukolekto kaj tiel fariĝis simbolo de ekscesa korupteco.

Ne nur noblaj motivoj

Ĝuste en tiu lando nun estas akuzita prezidento Jozefo Estrada pro korupteco kaj devis rezigni pri sia ofico. La eksa filmstelulo laŭ prokurora aserto akceptis ŝmirmonon por tolerado de kontraŭleĝaj loterioj. En Indonezio oni riproĉas

al prezidento Abdurahman Vahid fraŭdon kaj volas elficigi lin. Ĉinio plian fojon komencis kampanjon kontraŭ korupteco; oni senkapigis jam plurajn altajn funkciulojn pro tia krimo. Mortpuno riskas fraŭduloj ankaŭ en Vjetnamio.

Ne ĉiam pro noblaj motivoj oni batalas kontraŭ korupteco; povas esti ankaŭ politikaj rivaloj, kiuj tiel volas forigi malamatan politikiston. Tamen ĝenerale popoloj fariĝis malpli toleremaj, kiam temas pri nepotismo kaj korupteco. Kialo estas inter aliaj, ke fine de l' pasinta jardeko la ekonomio en Azio forte regresis, ankaŭ sekve de tiaj krimoj. Kion homoj toleris dum prospero, ili nun denuncas dum mizero. Precipe la mezaj klasoj, kiuj plej multe profitis el ekonomia progreso, nun sentas sin trompitaj kaj nun ribelas, kiel tre bone oni vidis en alia lando kun korupta sistemo, Turkio, kie manifestaciis precipe ordinaraj etkomercistoj kontraŭ la registaro.

Ankaŭ en demokratioj

Sed ankaŭ en riĉaj industrilandoj kun stabilaj demokratioj regas korupteco. Tion pruvas ekzem-

ple la skandaloj pri eksa kanceliero Helmut Kohl en Germanio kaj franca ŝtatprezidanto Jacques Chirac [jak ŝirák]. Tamen, ĝuste tiuj ĉi ekzemploj montras, ke la situacio estas iom alia en demokratioj kun liberaj amaskomunikiloj: aŭ ili aŭ justicinstancoj kutime iam malkovras koruptecon kaj persekutas ĝin. Sed eĉ pli grave estas, ke ŝmirmono ne estas fenomeno en ĉiuj sferoj de l' (publika) vivo. Mi kiel germana civitano ne devas subaĉeti ŝtatan oficiston, por ke tiu plenumu sian taskon laŭ mia postulo. Inverse mi ne povas per ŝmirmono persvadi policanon rezigni pri punmono pro trafikdelikto. Se mi provas, mi riskas eĉ plian punon ...

Riĉaj demokratiaj landoj povas pagi al siaj oficistoj relative bonajn salajrojn, tiel ke ili ne bezonas ŝmirmonon – se ili ne estas avidaj. En ne tiom riĉaj landoj salajroj kutime ne sufiĉas por vivteni sin kaj familion; ŝmirmono do estas necesa. Nu, oni povus diskuti, ĉu ne estas indiferece kiel civitanoj finansas oficistojn: per impostpagado aŭ

per subaĉeto. Eĉ oni povus diri, ke ŝmirmono estas pli justa, ĉar pagas ĝin nur tiu, kiu vere bezonas servon. Nu jes, se oni havus reglamenton pri koruptado ... Sed tiu ĉi sistemo estas arbitra kaj do nejusta, ĉar oficisto povas mem fiksi sian kromsalajron, kaj riĉuloj povas pagi, malriĉuloj nur malmulte aŭ tute ne.




Malfacila batalo

Korupteco estas kiel ekscesa kancero en multaj landoj de ĉiuj kontinentoj, kiu trapenetris ĉiujn sferojn de l' publika vivo. Precipe en diktaturaj kaj totalismaj ŝtatoj kun aparte granda nombro de burokratoj ĝi estas tiom imanenta, ke eĉ post falo de diktatoro daŭras longe, ĝis demokratiaj fortoj sukcesas redukti aŭ forigi ĝin. Ne malofte – kiel ni vidas en Rusio kaj aliaj ekskomunismaj ŝtatoj – al ordinara korupteco aldoniĝas eĉ pli terura plago: mafiaj krimbandoj riĉigas sin per ĉantaĝoj.

Suferantaj homoj ofte ne scias, kiel batali kontraŭ reto de korupteco, kiel ŝanĝi la sistemon. Batalemaj demokratioj tial facile falas en rezignacion. Tamen, se oni nun persekutas ĉefojn kaj pintulojn kaj tiel dehakas la kapon de l' drako korupteco, eble ili kaptas novan esperon. Krome povas esti, ke ekonomia tutmondiĝo helpas redukti la plagon. Kiel vi povis legi en februaro 2000 en tiu ĉi revuo, internacia komerco ne plu pretas toleri koruptadon. Jen do, tutmondiĝo povas alporti ankaŭ pozitivajn efikojn.

Stefan MAUL



La ĉina aŭtoindustrio atendas altan tajdon.

ĈINIO

Dekono de la familioj baldaŭ aĉetos aŭton

Decembre de 2000, en pli ol 20 urboj grandaj kaj mezgrandaj, la Ĉina Konsumanta Asocio faris enketon pri aŭtoj kaj familioj.

En ĉiu urbo la asocio elektis 500 enketotajn familiojn kaj petis ilin detale respondi al la donita demandilo. La rezulto de la enketo aperis en pluraj gravaj ĵurnaloj en la komenco de februaro.

La asocio esperas ke per la rezulto produktantoj kaj komercantoj de aŭtoj informiĝu pri la ŝanĝiĝoj de la ĉina aŭtomarkato dum la venontaj kvin jaroj.

Multaj senaŭtuloj havas konduklicencon

Anticipe oni difinis ke inter la 500 enketotaj familioj 100 estas aŭtohavaj kaj 400 senaŭtaj. 81 % de la demanditaj personoj aĝas ne super 45 jaroj. La enketo montris ke, ĉar inter la senaŭtaj konsumantoj 31 % jam havas konduklicencon, en la ĉina aŭtomarkato estas kaŝita granda latentata forto.

Inter la enketitaj familioj tiuj, kiuj pret-

igis sin aĉeti aŭton en 2001 okupas dekonon. 16 % planas aĉeti aŭton en 2002, 70 % de 2003 ĝis 2005. El tio videblas, ke dum 2005-2010 en Ĉinio okazos la alta tajdo de privata aĉeto de aŭtoj.

Al la demando pri la origino de la aĉetota aŭto, 13 % deklaris emi posedi aŭton produktitan de Ĉinio. Ju pli demanditoj estas malgrandaĝaj, des pli ili preferas aŭton importitan. Rilate al koloro kaj tipo, plejparto opinias ke aŭto devas esti oportuna al praktika vivo. 55 % de la aĉetontoj preferas dupordan limuzinon. La ŝatataj koloroj laŭvice estas nigra, blanka, ruĝa, grizflava, blua kaj malhelverda.

Kostoj gravas

Kiam oni aĉetas aŭton por familia uzado ĉefe estas konsiderataj prezo, servado post vendo, benzinkonsumo

KONGO

Impostoj nervozigas la komercistojn

La registaro de Konga Demokratia Respubliko de Kongo decidis, ke ĉiuj enlandaj financaj transakcioj devas okazi en kongaj frankoj. La celo estas bridi la rapidan senvaloriĝon de la mono.

La devizojn necesajn por importado komercistoj akiras parte en bankoj (kie la kurzoj estas fiksitaj de la registaro), sed precipe en kaŝe funkcianta paralela merkato. En decembro 2000, usona dolaro kostis 50 kongajn frankojn en bankoj kaj 120 kongajn frankojn en la paralela merkato.

Ankaŭ la prezoj de la importitaj varoj estas kalkulataj laŭ la kurzo de la paralela merkato. Tamen, la importimpostojn la komercistoj pagas laŭ banka kurzo. Tial la ministro pri financoj en oktobro 2000 decidis, ke tiuj impostoj devas esti pagataj en dolaroj. La decido nervozigis la komercistojn, kiuj sekve altigis la varprezojn.

Ekvidante la katastrofon, la registaro nomumis alian ministrinon, iom ŝanĝis la decidon kaj forigis multajn aliajn impostojn. En decembro la merkato stabiligis. Ĉar la ŝanĝo estis provizora por 45 tagoj, la registaro konfirmis ĝin en januaro 2001. Malgraŭ tio, la prezoj daŭre altiĝis kaj la kurzo de la dolaro sur la paralela merkato kreskis ĝis 190 kongaj frankoj en januaro.

Zandandu Ntomono ZOLA

kaj fabrikmarko. Nur 38 % ne volas pruntepreni monon de banko por aĉeti aŭton. 89 % el la enketitoj, kiuj havas aŭton, estas kontentaj aŭ principe kontentaj pri sia aŭto. La kritikoj ĉefe koncentriĝas je benzina ekonomieco, komforto kaj prilabora precizeco.

La prezo de aŭto kaj la kromaj kostoj estas granda malhelpo al la disvolvigo de la aŭtomarkato. 73 % ne tro kredas la informojn de la aŭtoreklamo, ĉar ĉinaj komercistoj ofte teksas mensogojn por beligi siajn varojn. Nuntempe, la plej ŝatata ĉina marko estas *Santana*, de Ŝanhaja Aŭtofabriko.

MU Binghua



Solecaj fraŭlinoj en noktaj amuzejoj kutime atendas riĉajn fremdlandanojn.

LITOVIO


Kiel sumojn konsumi ...

En noktaj kluboj en Litovio populariĝis nova servo – t.n. konsumado. Ĝia celo: „helpi” al eksterlandanoj elspezi monon. Centoj da virinoj okupiĝas en la litova ĉefurbo Vilnius pri konsumado: viga kaj komunikema virino povas enspezi nokte ĝis mil dolarojn. Konsumado neiel – laŭ la virinoj – ligiĝas al seksumado.

La virinoj ricevas honoraron, kiu dependas de la kvanto de alkoholo konsumita de kliento. Koktelo kostas foje 20 usonajn dolarojn, kaj la virino ricevos de la proprietulo de la nokto-klubo kvin dolarojn. Multaj virinoj trinkas nenion, konsumante kun kliento senalkoholan „koktelon”. Se virino ja devas konsumi

alkoholon, ekzistas en kelkaj kluboj tabloj enhavantaj truojn, en kiujn virino povas kaŝe verŝi nedeziratan trinkaĵon. Laŭkontrakte la virinoj ne rajtas ebriiĝi.

Kelkaj virinoj havas bonŝancon. Laŭdire venis iam kliento, kiu enamiĝis al unu el la virinoj kaj finfine pagis por ŝi ĉiujn kostojn de universitata studado. Virinoj ricevis ankaŭ loĝejojn kaj aŭtomobilojn. Klientoj devenas ĉefe de Germanio, Danio kaj Aŭstrio. Kun ili la virinoj komunikas ruse aŭ angle. Litovoj estas senesperaj klientoj, kiuj ne komprenas, kial elspezi multan monon. Tamen ŝajnas, ke la plej bonaj klientoj estas parlamentanoj de najbara lando. LAST/pg



En parko apud la litova ĉefurbo Vilnius estas kreita skulptaĵo konsistanta el pli ol tri mil malnovaj televidiloj. La skulptaĵo primokas la absurdon de sovetia ideologio disvastigita dum 50 jaroj per tiuj aparatoj. Tiuj, kiuj vizitas la parkon, povas promeni tra „televida labirinto” kaj tiel senti ties vakuon. La „skulptitaj televidiloj” pezas pli ol 150 tunojn. LAST

Post domaĝo ... omaĝo

En 1933 du litovaj aviadistoj, Steponas Darius kaj Stasys Girenas, intencis per memkonstruita aviadilo transflugi Atlantikon kaj surteriĝi en Kaunas, la tiama ĉefurbo de Litovio. Tamen, antaŭ ol atingi Litovion, la aviadilo kraŝis en arbaro apud la limo germana-pola. Por omaĝi al la du aviadistoj, litovdevena usona piloto Julius Sakas en 2003 – 70 jarojn post la fatala flugo – kompletigos la vojaĝon per preciza kopio de la aviadilo de la du pioniroj. Li flugos de la arbaro ĝis Kaunas – kio kostos al la 57-jaraĝa flugkompania kapitano 150 000 usonajn dolarojn. LAST

NEDERLANDO

Poezio enRETigita

Metroo povas etosi en beletro (kiel en la romano „Metropoliteno” de Varankin), sed ankaŭ beletro povas etosi en metroo. Tio jam ekde 1997 proviĝas kaj pruviĝas en la subteraj vagonoj de la roterdama trafik-entrepreno RET, kiu en ĉiu tria monato afiŝas novan seson da poemoj vid-nivele por pasaĝeroj.

Kadre de ĉi tiu RET-projekto, „Poe-mo al la vojaĝanto”, en la unua jarkvarono de 2001 legeblis en la roterdamaj metroo kaj tramoj sonetoj de Gerrit Komrij [ĝerit komrej], unu el kiuj estis speciale verkita por ĉi tiu uzo. En la postaj jarkvaronoj sekvos verkoj de poetoj partoprenantaj la tradician roterdaman aranĝon Poezio Internacia; portugaliaj aŭtoroj (ĉi-jare, Roterdamo kaj la portugala Porto kunestas „Kulturaj Ĉefurboj” de Eŭropo); fine kaj krone, la pasaĝeroj distros sin per poemoj triumfintaj en verko-konkurso.

En 1999 la malgranda roterdama eldonejo Aristos (ĉe kiu, cetere, premieris la nederlanda eldono de „Paĉjo, kio estas rasismo?”) aperigis, sub egido de RET kaj Poezio Internacia, 144-paĝan volumeton kun ĉiuj ĝistiamaj „RET-poe-moj”: la libro estis ne nur donacita al RET-dungitoj, sed ankaŭ fariĝis en Roterdamo unu el la kvin plej vendataj libroj en la kristnaska periodo. Eĉ la malnovaj poem-afiŝoj ne tute pereas: la entrepreno mediprotekte fabrikigas el ili skribil-tenilojn, rubujetojn, dosierujojn kaj plastajn sakojn, kiuj povas bele servi kiel donacoj de la firmao. István ERTL

LITOVIO

Pinoj mortas

Laŭ litovaj naturprotektantoj pinarbaroj de suda Litovio povas sperti ekologian katastrofon pro invado de 3-4 cm longaj raŭpetoj de pinaj papilioj.


S pertuloj el la departemento de arbaroj kaj protektataj teritorioj asertas, ke tiuj estas la plej danĝeraj parazitoj de pinaroj en Litovio. Unu papilia femalo printempe ovumas sur pinaj pingloj ĝis 300 ovetojn. Post du semajnoj la raŭpetoj komencas ronĝi novajn pinglojn, burĝonojn, stolonojn. Kiam la raŭpoj multiĝas (ili evoluas rapidege), ili nutras sin ankaŭ per malnovaj pingloj. Kaj la pinoj mortas.

Forstistoj konstatis, ke nur en julio 2000a la parazitoj mortigis la pinaron sur ĉirkaŭ 33 000 ha, do kvaroble pli ol dum la antaŭa jaro. Ekstermi ilin per insekticidoj kostus ĉirkaŭ 800 000 eŭrojn. Sed mono por tio mankas. Interalie dum la soveta periodo mono por insektomortigiloj sufiĉis, tamen pro tiamaĵ ne specialigitaj kemiaĵoj pereis ankaŭ utila faŭno.

Iuj naturprotektantoj opinias, ke ne estas necese batali kontraŭ la invado

de parazitoj, ĉar post certa tempo la naturo mem solvos la problemon per animaloj, manĝantaj la raŭpojn. Iliaj malamikoj estas muŝoj, taĥinoj, brakonidoj, insektoj de iĥneŭmona svarmo, ceteraj virusoj. La raŭpojn atakas ankaŭ mikozaĵ malsanoj, pluraj birdoj, formikoj kaj aliaj animaloj. Tamen forstistoj estas certaj, ke ne eblas prokrasti la defendadon, ĉar la pinaj parazitoj konkeras novajn areojn.

LAST



Ses homoj mortas ĉiunminute pro fumado.

Fumado aŭ sano

La Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) publikigis donitaĵojn pri fumado.

En la mondo estas 1,1 miliardoj da fumantoj. En la evoluantaj landoj 41 % de la viroj kaj 21 % de la virinoj fumas, en la evoluantaj pli ol 50 % de la viroj kaj 8 % de la virinoj.

En la evoluantaj landoj plenaĝulo averaĝe konsumis en 1980 2800 cigaredojn, en 1990 nur iom malpli: 2400 pecojn. En la evoluantaj landoj estis grava kresko: de 1150 pecoj en 1980 al 2400 pecoj en 1990.

En la mondo nuntempe ĉiujare mortas 3 milionoj da homoj pro fumado, tio estas ses homoj ĉiunminute. Se la nuna tendenco de fumado daŭros plu, en 2020 la nombro de la mortintoj atingos 10 milionojn.

PENG Jianjun

Teo sur ... plaĝo

L oĝantoj de la litova havenurbo Klaipeda iun printempan tagon amase direktiĝis al la marbordo por tie kolekti paketojn kun ... teo. Ili asertis, ke la nigra teo bordenĵetita de Balta Maro tre bonodoras kaj bongustas.



Teo sur bordo senkoste

La teo disŝutiĝis el unu el 27 konteneroj, kiuj dum ŝtormo deglitis de la ferdeko de ŝipo „Ost Wind” trafikanta sub la standardo de Antigvo-Barbudo el Hamburgo al Klaipeda. Ĝi entute transportis 69 kontenerojn kun nutraĵo kaj vestaĵoj. La ŝarĝo defalis, kiam ĝis la celo restis nur 12 marmejloj. Ventrapido atingis 25 m/s (90 km/h). Pri tio estis avertitaj ĉiuj ŝipestroj. Ĉi-okaze vane.

Naturprotektantoj asertis, ke la disŝutita teherbo ne multe damaĝos la strandon. Ĝi surbordiĝis nur laŭlonge de 150 metroj. Krome, amase venintaj homoj preskaŭ ĉion kolektis. Multaj plastaj teherbaj paketoj bone konserviĝis, tute taŭgis por uzado. Homoj prenis ankaŭ humidajn paketojn – per tiu ĉi teherbo ili intencis sterki plantojn.

LAST

Lupreneblaj kristnaskaj arboj

La Ordeno de Kavaliroj „Verda Penso” en Hungario anoncis agadon kontraŭ la elhako de pinglarboj. Apogis ĝin la Nacia Parko Danubo-Dravo kaj la Arbar-bieno de Mecsek AS. En la lando ĉiukristnaske oni elhakas du milionojn da pingloarboj. La kvanto estus malpligrandigebla, se oni luprenus pingloarbojn en potoj. Fakte antaŭ la Kristnasko de 2000 aperis granda kvanto da pinglarboj en potoj, kio antaŭe okazis nur pri tre malgrandaj pingloarboj, sed ne lue.

OH

MATEMATIKO

Komparo de instrumentoj


En majo 1998 estis publikigita internacia kompara studo pri matematiko kaj sciencoj: TIMSS (*Third International Mathematics and Science Study*). La analizado de tiu kompara studo ankoraŭ ne finiĝis. Tamen indas kaj interesas pripensi kaj pridiskuti rezultojn kaj konkludojn koncernajn.

Mi mem povas serioze prijuĝi nur germanajn lernejojn. Volonte mi ekscios faktojn, opiniojn kaj memoraĵojn pri lecionoj, instruistoj, sukceso, ktp en lernejoj alilandaj.

Evidentiĝis, ke gelernantoj en Japanio pli sukcese lernas kaj pli kapablas ol usonaj kaj germanaj gelernantoj. Kial do? Kompreneble la rezultoj de TIMSS iel maltrankviligis kaj nervozigis la germanajn politikistojn respondecajn pri instruado, la gepatrojn ambiciajn kaj certajn ke ili transdonis nur plej bonkvalitajn genojn, kaj la geinstruistojn kiuj jam delonge plendas pri stulteco kaj maldiligento de la juna generacio, precipe en Germanio, kaj samtempe admiras iujn ege lernemajn kaj laboremajn japanojn, kvankam iom meditas kiel tiu malbona rezulto povis okazi malgraŭ bonegaj lecionoj. Ne tro maltrankviligis la TIMSS-rezultoj la gejunulojn, ĉar ili ne interesiĝas pri tiaj enuigaj lernejoj. Nur nervozigis ilin eble, ke kelkaj ministroj ordonis tuj aranĝi plian ekzamenon matematikan por kontroli, ĉu TIMSS pravis ...

Kelkaj seriozaj sciencistoj kaj instruistoj nun serĉas verajn kialojn kaj intertempe jam trovis plurajn eblajn.

En Japanio, kaj elementa lernejo (unua ĝis sesa klaso) kaj meza lernejo (sepa ĝis naŭa) estas komunaj, unuecaj, samaj por ĉiu lernanto. Ne okazas disdivido en grupojn laŭ sukceso, notoj, scipovo, talento ktp. Ne ekzistas deviga ripeto de klaso post malsukcesa jaro. En Germanio oni ĉiam denove selektas infanojn. Tio signifas ke lernantoj nesufiĉe sukcesaj, inteligentaj, diligentaj (rapidaj, obeemaj?) ktp ne rajtas avanci en sekvantan klason. Kaj post nur kvar jaroj de komuna lernado la plej sukcesaj infanoj rajtas transiri en gimnazion, en kelkaj federaciaj landoj ankaŭ en mezlernejon. En aliaj landoj tio okazas



En Japanio ne ekzistas deviga ripeto de klaso post malsukcesa jaro.

post la sesa klaso. Ĉiuj aliaj restas. Tamen oni ne nomas ilian lernejon „restlernejo”, sed „ĉef-lernejo” ...

Ĉu multope pli bone?

En Japanio sidas meznombre 37 gelernantoj en unu klaso, en Usono 27, en Germanio 24. Ĉu oni lernas des pli bone, ju pli da akompanantaj kunlernantoj apudas? Ĉu tial en universitataj aŭditorioj sidas centoj da studentoj?

La lecionoj en Japanio estas evidente aliaj ol en Germanio. La instrumano estas ilustra kaj vigla. La

taskoj estas kvazaŭ enigmoj ekscitaj. La instruistoj ebligas al la lernantoj mem serĉi solvojn, prezenti provojn kaj strategiojn, kaj oni kompare pridiskutas diversajn rezultojn. Multan tempon oni uzas por prilabori malnetajn matematikajn konceptaĵojn kaj intensive kompari ilin. Kontraŭe, en Germanio ofte okazas

'En Japanio laŭraporte la lecionoj okazas en atmosfero de studado, ne de ekzamenado, klasifikado kaj selektado'

lecionoj, dum kiuj instruisto gvidas la disvolviĝon aŭ ellaboriĝon de formulo, kaj poste devigas la gelernantojn parkere lerni kaj ekzerce

apliki tiun formulon.

Kiel en tempo de Sokrato oni praktikas „majeŭtikon”, la arton de didakta

akuŝistino. Kredante ke la kapabloj kaj scioj jam dormetas en la interno de infanoj kaj studantoj, oni klopodas ruze helpante ellogi ilin ... Fakte okazas io alia: instruisto, tre bone konanta la celon de la leciono kaj diligente preparinte la temon, demandas aŭ demonstras ion. Unuopaj lernantoj aŭ false respondas aŭ malkomprenas, kaj la instruisto mallaŭdas ilin kaj sin turnas al aliaj, ĝis iu lernanto ĝuste respondas. La instruisto laŭdas, ĝojas pri la sukceso kaj daŭrigas. La plimulto de la studantoj komprenas ne tro multe. Kaj ne malofte infanoj sentas ofendon, ĉar en unu leciono nur unu aŭ du fojojn estis ilia vico, ĉar la instruisto estis malkontenta pri la neatendita malĝusta respondo, aŭ ĉar li denove demandis tiun fian najbarinon. Kaj ĉiutage ili devas timi tiujn subitajn ekzamenetojn kaj pri-demandadojn, per kiuj ili estas klasifikataj laŭ taksociferoj.

La sciencistoj eltrovis, ke en Japanio instruistoj konfrontigas lernantojn al altnivelaj realecaj problemoj. Tiujn ili prezentas plastike kaj vive. Unue oni intense pridiskutas la problemon kaj poste la lernantoj komencas praktike prilabori ĝin. Preskaŭ ĉiu problemo havas plurajn solvojn diversformajn aŭ diversvojjajn. Oni komparas, esploras, analizas, pritaksas la solvojn, eĉ la maltaŭgajn oni akceptas. Ankaŭ eraraj solvoj povas esti interesaj kaj instruaj. Solvojoj estas pli gravaj ol rezultoj.

Mi donas ekzemplon: lu homo heredis kastelon kun granda parko kaj monsumon imponan. Li intencas okazigi grandan inaŭguran ĝardenfeston. Ĉar li mem havas nek tempon nek emon falĉi la park-gazonon, li serĉas per gazetanonco ĝardeniston. Li ricevas tri ofertojn: la unua ĝardenisto promesas falĉi la gazonon en ses horoj, la dua volas fari tion en kvar horoj, kaj la tria certas fini la laboron en tri horoj. Ĉar mono inundas, la nova kastelpatrono dungas ĉiujn tri. Kiom da tempo ili bezonos por falĉi la gazonon? Vere simpla kalkulo, kiam oni estas kondukata de instruisto kiu jam konas

la solvon. Sed propravoje trovi solvon? Ĉu simpla? Provu mem!

Fermat

Interesan eldiron mi trovis en traktajo pri la konata *Lasta teoremo de Fermat*. Andrew Wiles diris ke „Taniyama ne estis tro skrupule ekzakta matematikisto. Li faris multajn erarojn, sed li eraris en bona direkto kaj fakte atingis ĝustajn rezultojn. Kaj mi provis imiti lin, sed mi eltrovis ke ege malfacilas fari taŭgajn erarojn.”

Kontraŭe, en Usono kaj en Germanio oni foruzas multan tempon pro ekzercado de rutinaj procedoj/kapabloj. En Japanio laŭraporte la lecionoj okazas en atmosfero de studado, ne de ekzamenado, klasifikado kaj selektado.

Krome, hejmtaskoj, libervolaj ekzercoj kaj privataj kromlecionoj en Japanio estas normalaj kaj pezas multe pli. Japanaj infanoj por tio meznombro elspezas en la unua klaso proksimume po 4 horojn semajne (en Usono 1:10), en la kvina 4:20 ĝis 6 horojn (en Usono 2:20 ĝis 4:15). Por matematiko japanoj entute elspezas 7:30 horojn en unu semajno, same usonanoj, kaj germanoj 5:45 horojn.

Japanaj gelernantoj, gepatroj kaj geinstruistoj opinias ĉiutagan ekzercadon kaj ripetadon nepre necesa.

Gepatroj kaj pli aĝaj gefratoj intense subtenas, helpas kaj partoprenas la lernadon.

Jen eblaj kaŭzoj, kial japanaj gelernantoj en TIMSS-studo pli bone sukcesis ol usonaj kaj germanaj. Sed eblas ankaŭ aliaj kialoj. Eble la tuta sinteno, la disciplino, la

aprezo de lerneja lernado, la pensmaniero, la instruista sinteno rilate al infanoj kaj reciproke, aliaj detaloj aŭ io ajn influas la lernadon kaj ties efikon. La sciencistoj diras, ke tro homogenaj lernanto-grupoj ne bonas. En Germanio per ripeta selektado oni homogenigas lernanto-grupojn, klasojn, pecojn de lernejoj. Mi volonte ekscius pli pri subjektivaj aŭ sciencaj spertoj de tiu fenomeno.

IPFELKOFER Jomo



Pierre de Fermat.

Monato

KONEKTIĜI

- ▶▶ **KOLOFONO**
La bazaj informoj pri MONATO.
- ▶▶ **SPECIMENOJ**
Specimenaj tekstoj el MONATO.
- ▶▶ **TARIFO**
Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.
- ▶▶ **PERANTOJ**
Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.
- ▶▶ **ABONILO**
Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!
- ▶▶ **REDAKTOROJ**
Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.
- ▶▶ **MANUSKRIPTOJ**
Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.
- ▶▶ **KONVENCIOJ**
Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.
- ▶▶ **ANONCOJ**
Anonctarifoj de MONATO.
- ▶▶ **INDEKSOJ**
Indeksoj de MONATO por trovi aperintajn artikolojn.
- ▶▶ **RADIO POLONIA**
Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.
- ▶▶ **ETIKO**
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoskita de MONATO).

24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>

Deprimo

Nova statistiko farita ĉe la Londona Urba Universitato montras, ke (anima) deprimo kaŭzas al la brita reĝo du miliardojn da pundoj jare (tri miliardojn da eŭroj) kiel rektan koston. Se oni enkalkulas ankaŭ nerektajn kostojn (ekz. pro malpliigo de produktado), la tuto atingas ok miliardojn.

Ekonomiaj perdoj estas nur unu sekvo de deprimo, kiun oni diskutis en konferenco de la Londona Reĝa Medicin-Societo, sub la titolo: „Deprimo: Socia kaj ekonomia horloĝ-bombo”. La konferencon aŭspiciis Monda Organizaĵo pri Sano kaj la Medicin-Lernejo de Harvard (Usono), kun la celo atentigi pri la problemo.

En la konferenco 12 fakuloj el ok landoj traktis plurajn aspektojn de deprimo, interalie emon al la malsano, memmortigojn inter maljunuloj kaj la efikecon de novaj kuraciloj kaj laborkondiĉoj. „Deprimo ĉiam pli forte skuos la socion kaj ekonomion en la tuta mondo, sed oni ankoraŭ ĝin ofte subtaksas”, asertis la prezidanto de la konferenco, Arthur Kleinman. „Ĝi atakas multe pli da homoj ol la kancero, sed tamen oni elspezas tre malmulte da mono cele al ties solvo, kompare kun la kancero.”

Paulo S. VIANA

Formikoj en sukceso de 92 megajaroj

Dum la konstruado de suburba domaro laŭ la atlantika bordo de New Jersey [nju ĝersi] la terlaboristoj trovis 77-kilograman blokon da sukceso, aĝan 92 milionojn da jaroj. La sciencistoj kredas, ke la regiono iam estis tropike varma, malseka, kaj cedra arbaro ĉirkaŭis marĉojn, lagojn kaj lagunojn ĝis la rando de la oceano.


En tiu sukcesa bloko la sciencistoj malkovris centojn da insektspecoj, kaj estis surprizitaj pro la ekzisto de formikoj en tiu frua epoko kiam la dinosaŭroj ĉie regis super ĉio. Eltiritaj el tiu ĉi solida bloko estis sep specimenoj de tiuj fruaj formikoj.

La sukceso formiĝinta el arbsuko originis en la geologia epoko konata kiel Kretacea periodo, antaŭ 65-100 milionoj da jaroj. Muzea direktoro David Grimaldi diris: „Jen, primitivaj formikoj, kies ekapero estas ekstreme rara.”

Kiam la dinosaŭroj malaperis de la tero, la svarmo de la formikoj ege multobliĝis. Neniu povas klarigi ĝuste kial tia nombro subite eksplodis kaj disvastiĝis mondscale. Oni diras ke nuntempe la nombro de la formikoj tutmonde estas pli granda ol tiu de ĉiuj aliaj vivuloj.

Direktoro Grimaldi diris, ke la korpo de diversaj insektoj antaŭ 130 milionoj da jaroj portis specialan organon, la metapleŭran glandon, kies sekrecio estas acida kombino kiu similas al antibiotiko detruanta fungojn kaj bakteriojn. La plej multaj formikspecoj nuntempe ankoraŭ utiligas la metapleŭran glandon. Sen tiu ĉi organo la formikoj ekstermiĝus pro la netolerema natura ĉirkaŭaĵo kaj la mortigaj mikroboj.

Els B. SNOW



Bildfonto: Muzeo Amerikana pri Historio de Naturo

Geno de memmortigo trovita

Jam delonge la sciencistoj esploras la rilaton inter genoj kaj memmortigo, sed neniu pruvis, ke iu speciala peco de homa DNA pliigas la danĝeron de memmortigo, kvankam oni jam trovis iujn familiojn kun memmortiga inklino. Lastatempe britaj sciencistoj dum esplorado trovis, ke al memmortigantoj mankas la cerba kemia substanco nomata serotonino aŭ 5-HT (5-hidroksitriptamino), kaj ties nivelon regulas iu speciala enzimo. Certa speciala geno regas la produktadon de la enzimo. Do la homoj kun tiu geno pli inklinas al memmortigo, ol la aliaj. Tamen, la sciencistoj emfazas, ke homoj kun tiu geno ne nepre fa-

ros memmortigon, ĉar multaj aliaj faktoroj influas la danĝeron de sinmortigo. Ankaŭ homoj sen tiu geno eble faros suicidon pro ekscesa drinkado, psika konfuzo kaj malfacilaĵoj dum la vivo.

Ankaŭ en Usono la sciencistoj faris saman esplorado kaj opinias, ke por la homoj, kiuj montras emon al memmortigo, efektive la probablo de memmortigo estas ĉ. 55%. Nuntempe jam kelkaj medikamentoj povas altigi la nivelon de 5-HT, t.e. oni povas uzi medikamentojn por preventi memmortigon en iuj homoj. Tio tamen bezonas profundan, daŭran esplorado.

PENG Juan



Emo al memmortigo bezonas profundan esplorado.

KROATIO

Lagoj de Plitvice

Unu el la tuttagaj ekskursoj de la 86a UK en Zagrebo celos la nacian parkon „Lagoj de Plitvice” [plítvice], kiu situas je 139 km sude de Zagrebo. Ĝi facile atingeblas, ĉar ĝi troviĝas tuj apud la vojo, kiu ligas la kroatan ĉefurbon kun la ĉemara regiono Dalmatio.

La parko etendiĝas sur areo de 295 km² en la orienta parto de la montara kaj arbarriĉa regiono Lika, en kiu elstaras la montoj Mala Kapela kaj Plješivica. La plej alta pinto (1280 m) de Mala Kapela estas ankaŭ la plej alta pinto de la lagoj de Plitvice. Kvankam la parko estas je nur 80 km for de la Adria maro, en ĝi tamen regas kontinenta klimato, ĉar la Velebit-montaro (kun plej alta pinto 1757-metra kaj longeco de 145 km) disigas tiun regionon de la maro.

En la lagoj de Plitvice oni ĝuas freŝecon, belecon de lagaj kaj vegetaĵaj koloroj, vidindaĵojn de bruaj kaj ŝaŭmaj akvofaloj kaj kaskadoj ... La okuloj de vizitantoj ripozas, rigardante la verdajn de arbaroj – koniferaĵaj kaj alifoliaj, de arbustoj, herbejoj kaj floroj. Videblas papilioj samkiel aŭdeblas pepado de multaj birdoj (140 specioj en la parko). Eblas piediri laŭ la 8200 metrojn longa lagozono (kune kun la limoj de kelkaj golfetoj ĝi longas 9050 m), sed oni povas veturi per elektra trajneto certan distancon de la vojo ĉirkaŭ la lagoj kaj gajni pri la parko ĝeneralan impreson, kiu ofte restas la plej grava! Fakte oni proklamis la lagojn de Plitvice Nacia Parko en 1949, kaj ĝi estis enskribita en la UNESKO-listo de monda kulturheredaĵo en 1979.

Unikeco

La nacia parko „Lagoj de Plitvice”

estas unika, ĉar ĝi prezentas eksterordinaran fenomenon de kalkŝtona hidrografio: 16 lagoj kaj multaj lagetoj situas kaskade kaj estas kontinue ligitaj kun akvofaloj. La diferenco de alteco inter la plej supra lago kaj la komenco de la rivero Korana kiel fino de la laga sistemo estas 156 m. La lagoj dividiĝas je supraĵ kaj subaj.



V. KOVACIC



La geologia strukturo de iliaj fundamentoj estas tute malsama: la supraĵ lagoj formiĝis sur mildaj larĝiĝoj de dolomitoj, kaj la subaj en kalkŝtona kanjono, kie la majesta akvofalo Sastavci transformiĝas kaj plu fluas kiel la rivero Korana. Ĝi forlasas la lagojn, en la unua parto de sia fluejo, estigante kvar kaskadojn.

La laga sistemo funkcias enkadre de biologi-dinamika procezo, kaj nome: la pluvakvo, kiu fluas tra la supraĵa tertavolo akiras karbondioksidon, acidiĝas kaj solvas la karstajn fundamentojn – dolomito kaj kalkŝtono. Pere de specialaj specioj de algoj kaj muskoj la kalcia kaj magnezia karbonato sedimentiĝas en formo de kristaletoj. Tiuj lastaj gluiĝas al la muko, sekreciata de bakterioj kaj unuĉelaj algoj, estigante apartajn ŝton-sedimentojn, nomatajn *travertino*. Se oni rigardus la muskokurtenojn, en kiuj tra travertinaj barieroj trairas akvo, oni rimarkus, ke la muskokreskaĵoj estas verdaj kaj molaj, plejparte sen travertino. La lastjaraj muskokreskaĵoj



estas travertinaj, kaj pli maljunaj muskoj estas flavetkoloraj kaj tute ŝtoniĝintaj. Tiel kristaletoj amasiĝas kaj kreas travertin-formaĵojn, kiuj estigas barierojn, kanalojn, akvofalojn kaj kaskadojn. Tiu plantdevena travertino estas unikaĵo de la lagoj de Plitvice. Kristaletoj kovras ankaŭ la fundon de subaj lagoj, pro kio povas ekzisti lagoj sur poreca fundo kalkŝtona.


El la supraj lagoj la unua kaj plej alta estas lago Proščansko (636 m super la marnivelo, surfaco 0,68 km², profundo 37 m). La supraj lagoj finiĝas per multnombraj lagetoj, kiuj kune nomiĝas Burgeti. La meza, plej granda kaj plej profunda lago estas Kozjak (534 m super la marnivelo, surfaco 0,83 km², profundo 46 m), meze de kiu kuŝas insuleto Stefanija. Proksime al tiu insuleto veturas ekologia elektroŝipo por vizitantoj. La akvo el Kozjak falas en la subajn lagojn kaj de tie ĝi trairas tra la granda

akvofalo Sastavci al la kanjono de la rivero Korana, situanta je 483 m. Tra la akvofalo Sastavci en la riveron Korana enfluas ankaŭ la rivereto Plitvica, trapasante tra la 76 metrojn alta akvofalo.

El la kalkŝtona fundamento dekoj da riveroj enfluas en la lagojn. Plej konataj el ili estas Matica (konsistanta el la Blanka kaj Nigra riveroj); rivereto Rijecica, rivereto Plitvica kaj multaj subteraj riveretoj, inter kiuj iuj ne apartenas al la parko.

Grotoj

Al la naturvaloro de la nacia parko apartenas ankaŭ speleologiaj fenomenoj. En la areo de la supraj lagoj ekzistas la travertina bariero Labudovac. Trairinte tra ĝi, la fluanta akvo ŝanĝas sian direkton. Tie estas multaj grotoj kaj duongrotoj, nomiĝantaj „Grota ĝardeno”. Tamen la plej multaj grotoj troviĝas en la kalkŝtona parto de la parko, t.e. ĉirkaŭ la areo de la subaj lagoj.



La plej granda groto estas Golubinjača, longa je 165 m. Ĝi havas du grandajn truojn, altajn respektive 24 kaj 46 metrojn. En la groto ekzistas elĉizita ŝtuparo el 230 ŝtupoj. Specialaĵo de la nacia parko estas grotoj el travertino, estiĝintaj sub la akvofaloj. Multaj el la grotoj sur la parka areo ne atingeblas, kaj iuj el ili ne plu viziteblas pro ŝanĝo de la akvodirekto. Multaj el la grotoj estas loĝejoj de vespertoj.

Arbaroj

Pli ol tri kvaronojn de la parko okupas bone konservitaj arbaroj. Inter 400 kaj 1280 m super marnivelo ekzistas 11 arbaraj sektoroj. La arbaroj funkcias kiel protekta zono ĉirkaŭ la lagoj. Ĝi reguligas la klimatajn kondiĉojn, ebligas vivon kaj disponigas kaŝejojn al multnombraj ĉasbestoj, krome purigas la aeron kaj malhelpas tererozion. Tiu zono influas la dislokiĝon de pluvakvoj kaj la abundecon kaj stabilecon de la fontoj. La plej multnombra arbo estas

la fago, kiu okupas 73 procentojn de la arbara areo; la abioj – 22 procentojn. Inter aliaj arbospecioj, menciindas aceroj, kverkoj ktp.

La plej bone konservita arbarparto troviĝas en la nordokcidenta angulo de la parko, nome en la praarbara rezervejo „Ĉorkova uvala”. Tie ĉi sur areo de 80 hektaroj estas netuŝita praarbaro, konsistanta el fagoj kaj abioj. Ĝi estas leĝe protektata kiel arbara rezervejo.

En la arbaro vivas bestoj, el kiuj menciindas brunaj ursoj kaj lupoj. Ĉi tie vivas ankaŭ la rara kaj protektata lutro, kaj ankaŭ sovaĝaj katoj, musteloj, meloj, kapreoloj, cervoj kaj aproj.

La riveretoj de Plitvice riĉas je fiŝoj (ĉefe trutoj, eĉ ties kalifornia specio) kaj je kankroj.

Satĝuinte naturbelaĵojn, agrablan birdpepadon kaj bonodorojn, oni povus viziti surloke bonajn restoraciojn kaj manĝejojn por gustumi gastronomiajn specialaĵojn kaj trinki bonkvalitajn vinojn.

Mirjana JEJELJ

Cele al aviada terminaro

Prilingvaj teknikaj konsideroj por terminoj

Termino estas vorto aŭ esprimo speciala al iu scienco, arto, metio, fako. Estas facile konstati ke iuj terminoj ĝenerale estas komunaj al pluraj okcidentaj lingvoj, tiel laŭ la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko ili kvazaŭ aŭtomate establiĝas sen vundo al la zamenhofa fundamento de Esperanto, sen aĉiga sento al la fama vorto, neologismo. La prezidanto de nia akademio Geraldo Mattos en 1985, okaze de la traduko de romano *La Bagasejo* de José Américo de Almeida, el la portugala lingvo, skribis: „se tiuj restaĵoj post la eliro de la suko, el sukerkano, aŭ aliaj premitaj fruktoj estas nomataj hispane *bagazo*, itale *bagassa*, france *bagasse*, angle *bagasse*, germane *Bagasse*, portugale *bagazo*, kial en Esperanto tiuj samaj aferoj ne povas esprimiĝi per la vorto *bagaso*?”

Ni intencas establi nian aviadan terminaron laŭ tiu principo, laŭ la Fundamento, sen pliaj komplikaj lingvistikaj kaj aliaj, sed en plena praktikeco. Ni scias, ke nia jam ekzistanta kaj bone funkcia PIV permesas senprobleman skribadon de vulgarigaj teknikaj verketoj, do ni nin turnu nur al pli kompletaj teknologioj laŭ tiuj simplaj kaj praktikaj metodoj, sen la timoj pri teoriumado kiujn la esperantistoj ĝenerale havas.

Se Esperanto estas relative simpla, ni devas ĝin prezenti tiel kaj tia. Kiel inĝeniero, sen intenco pri negativa kritiko al la fama, ampleksa *Fervoja Terminaro*, mi devas tamen signali, ke *roue magnétique* en la franca, *roda magnética* en la portugala, aŭ io kiel *magnetic wheel* en la angla, fariĝis en Esperanto, nekredible, *bazunuo de magnetŝveba tekniko*. Mi oftege uzis magnetajn (ankaŭ elektromagnetajn) radojn, ne nur en „ŝvebo” sed ĉefe en kluĉado aŭ bremsado ktp. Mi opinias, ke la prezento laŭ tiu formo de tiu kaj aliaj nocioj aŭ difinoj, estas granda malpropagando por Esperanto. Jen, *ramplo de ekveturo*, france *rampe de démarrage*, portugale *rampa de arranque* fariĝis en tiu sama terminaro: *ekveturramplo malkruta* (post stacia ekvetursignalilo). Oni divenas la

intencon doni pli precizan difinon, sed tamen tiel nia lingvo aspektas, por neesperantisto, komplika, malbela, germaneca aŭ komputileca!

Ankaŭ PIV de tempo al tempo, sub teknika vidpunkto venas kun tre amuzaj nocioj. Sub la kapvorto *fendi aperas* la termino *aerfendo*, „2) La mallarĝa interspaco inter statoro kaj induktato de elektra maŝino”. Jen bona difino por malbona termino, ĉar la interfera spaco ne respondas al la nocio pri fendo, kaj ne devige estas aero en tiu spaco. Kiel fabrikanto de „hermetikaj pumpiloj” (la konstrumano estas en mia samtitola kajero) en la interfero (mi dum 40 jaroj uzas tiun terminon), france *entrefer*, portugale *entreferro*, ne estas aero, sed septo de mufo kaj kapsulo el neoksidebla ŝtalo, kaj iom da pumpata fluido, el la plej diversaj konsistoj, do „aerfendo” estas por mi tre amuza ... kaj ne ĝusta!

Dum mia tuta profesia agado, kiel normale inteligenta inĝeniero, kiel Esperanto-uzanto, mi sentis daŭran ĝenon rilate al la distingo pri varmo-sento kaj varmo-energio. Varma estas adjektiva kapvorto kiu klare rilatas al homaj sentoj nur. Oni mezuras tiun senton, la temperaturon, per termometro aŭ pirometro. La vorto „varmokvanto” estas teknike sensenca, kaj ne kontentige esprimas la ideon pri energio rilata al varmo. Tiun formon de energio oni mezuras per kalorimetro kies unuo estas la kalorio ... sed jen mankas la termino por tiu energio, france *chaleur*, angle *heat*, latine, hispane, portugale *calor*, do tute nature en Esperanto: Kaloro. Feliĉe en la *Meteorologia Terminaro* de Maurice Lewin, Jarlibro de UEA-1961, la vorto ekaperas.

Pri aviada frazeologio

La aviada frazeologio – tio estas, la teknikaj frazaroj, specifaj kodoj, konvencijaj formuloj por trafiko de avioj, do por la komunikado inter surteraj gvidistoj kaj pilotoj – estas tute aparta lingvaĵo, slango.

Tial, multaj nesufiĉe sciaj esperant-



istoj opinias, ke Esperanto ne alportos grandajn avantaĝojn por la frazaroj. Mi eĉ ĵus legis de „gravulo” ke la elparolado de Esperanto estas egale varia kiel la angla laŭ la diversaj landoj, kio estas nereala, stulta, antaŭjuĝa opinio. Male oni povas konstati en la universalaj kongresoj, ke la plej diversaj akĉentoj ne malhelpas la perfektan komprenon de la lingvaĵoj, escepte se la parolanto estas eterna krokodilo. Eĉ la „terura” akĉento de nia klerega, kara Marjorie Boulton, folklore amuza, kun ties ĉarmo ne malhelpas la ĝustan komprenon, almenaŭ sur la tero. Jes, la fonetikeco de Esperanto estas entute taŭga por la aviada lingvo.

Multaj aliaj homoj vidas malfacilaĵojn pro la prefiksoj kaj sufiksoj, kiel *mal*, kaj la korelativoj, la tro similaj pronomoj ktp. Bone, por aviado Esperanto estas sufiĉe riĉa por eviti la uzon de *mal*, ekz. oni uzas *dekstra* kaj *liva*, ne la danĝeran *maldekstra*. La pronomoj praktike ne eniras la frazaron, oni nur uzas subjektojn, kiel nomojn (kiujn oni literumas) kaj la siglojn: ĉu matrikuloj de avioj, ĉu mallongigaj kodoj de aerodromoj, ktp. La konjugacio de verboj limiĝas preskaŭ ekskluzive al du tempoj, la prezenco, ĉar la agoj okazas en la estanteco, kaj la imperativo por transdono de instrukcioj

en la gvidado de trafiko. Esperanto estas aparte taŭga, per -as kaj -u je ĉiuj personoj. Oni ne diras *jes* aŭ *ne* sed *pozitiv'* kaj *negativ'*, ja sendubaj. Oni ne supreniras aŭ malsupreniras, sed oni jen soras aŭ soriras, jen descendas; ne ascendas, ne subiras. *Ascendi* kaj *descendi* kune estus danĝeraj, sekve simplaj, taŭgaj solvoj entute ekzistas. Numeraloj povus venigi dubojn, ekz. *ses* kaj *sep* preskaŭ samsonaj, kaj ĉiuj aliaj pro la unusilabeco; sufiĉas aldoni -o en la fino: unuo - duo - trio - kvaroj - kvinoj -

tri plus tri (konvencie: *ses*) - *sepo* - *okonaŭo* - *deko* - *nulo*. Tiuj artifikoj estas facilaj; ekzemple la francoj ne uzas *un* sed *unité* (unuoj), kaj la portugal-lingvanoj de Brazilo sendubigas *seis* (*ses*) per *meia duzia* (duona dekduo).

Fundamente grava por aviado estas la literuma alfabeto, kiu devas esti tre klara, ne dubiga, mallonga. La ekzistanta literumilo surbaze de la angla lingvo ne taŭgas por Esperanto. Ankaŭ la literuma alfabeto prezentita de UEA en la lastjaraj Jarlibroj ne estas oportuna pro la 3 aŭ 4

silabaj vortoj; ekzemple por la dusilaba *cirklo* ni devus diri: centimetro - insekto - rekordo - kilogramo - legendo - oktobro - ĉu intertempe la avio cirkle, spirale ne kraŭsus?

Ni pensis pri du-silabaj vortoj kun almenaŭ du konsonantoj, sub ilia originala formo de kapvortoj. Ĉar Esperanto akcentas la antaŭlastan silabon, la unua silabo estas la akcentita, tiu de la koncerna litero, kio fortigas la elparolon. Ni sugestas: alfa (konservebla angla vorto, kiu estas esperanta) - barbo - cirklo - ĉerko - disko - edro - forta - gorĝo - ĝermo - halti - ĥoro - iglo - jardo - ĵongli - komo - lordo - mardo - nokto - ofte - porti - Q: kuo - rosti - sorbi - ŝildo - tordi - umo - ŭato - vorto - W: vo germana - X: ikso - Y: greka i - zebro.

Por tiuj, esperantistoj idealistoj, kiuj argumentas, ke estas tute neeble lernigi Esperanton al ĉiuj pilotoj kaj gvidistoj de aertrafiko de la tuta mondo, mi aldonas ke preter idealismo ekzistas entreprenemo, iniciatemo, la volforto kiu facile teknike trovas la rimedojn kaj sistemojn por atingi la celon. Kaj en kursoj, kiuj instruas la aviadajn sufiĉe komplikajn objektojn, nia lingvo Esperanto ne estos granda ĝeno kaj tute ne obstaklo. La obstaklo staras sole ĉe la homa stulteco en politikaj intereso.

Gilbert LEDON

'la fonetikeco de Esperanto estas entute taŭga por la aviada lingvo'


Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo.

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo 9 EUR (plus afranko).

Se vi mendos 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



La husaro-aeronaŭto

Li estis poligloto. Laŭdire li regis aŭ almenaŭ bone konis pli ol 25 lingvojn. Kaj li estis aŭtoro, verkis poemojn, eseojn, romanojn, teatraĵojn kaj multajn skribaĵojn, kies ĝenroj ne apartenis al ordinaraj. Li havas sian apartan lokon en la nuntempa literaturo.

Foje li ja estis grupema, ekzemple en la 1950aj jaroj li estis la centrulo de la „Viena Grupo”, avangardistoj ĉirkaŭ la *Art Club*. Ĉi tiu „Art” ne signifis simple laŭmodan adopton de la angla vorto, sed havis – kiel multaj vortinventoj de la aŭtoro – kromsignifon. Lia nomo nome estis Artmann („Viro de la arto”), ja ne pseŭdonime; vere li estis Hans Carl Artmann, konata kiel H.C. Artmann – sigelo por abunda fantazio kaj majstra regado de la literaturaj rimedoj.

Lia unua furoraĵo jam indikis la vojon: „Med ana schwoazzn dintn” („Per nigra inko”) konsekvence uzas la vianan dialekton, iel transpontante la fendon inter estetika eliteco kaj popola amaskulturo. Aliaj verkoj stile sekvis barokajn modelojn; ĉerpis el la lingvoj konataj, inventis transrealajn mondojn. Liaj tradukoj aperis el tiom disaj lingvoj kiel la gaela, la jida, la sveda, la hispana. Li ne nur skribis, sed ofte publike voĉlegis siajn verkojn; restis multaj registraĵoj de ĉi tio.

Estiĝis vivoverko, kiu akiris vastan renomon kaj rekonojn kiel honorigojn kaj premiojn, inter ili la „Granda Aŭstra Ŝtatpremio” (1974) kaj la „Georg-Büchner-premio” (1997, ĉ. 120 000 eŭroj). La lasta ankoraŭ ĝustatempe atingis lin. Jam malforta, Artmann laboris plu, ĝis kormalsano mortigis lin, preskaŭ 80-jaran, la 5an de decembro 2000 en lia naskiĝurbo Vieno.


Kiel multlingvulo li konatiĝis ankaŭ kun Esperanto, eĉ skribis teksteton pri tio, enkondukon en la prozaĵon „En la somero 1935”. La normallingva specimeno (oni preskaŭ ne povas traduki lian literaturan lingvaĵon) paroligu la aŭtoron senkomente:

„En la somero 1935 mia onklo Alois donacis al mi malgrandan lemolibron pri la kimra lingvo, li mem ne povis utiligi ĝin, mi estis danko al li. Li estis ricevinta tiun ĉi libron en la antaŭa jaro dum

restado en Anglio de knabino esperantista. Tiam estis granda Esperantotempo, ankaŭ mi lernis ĝin. Mia duona familio lernis ‘Dr. Zamenhofs lingvo’ (tiel!). Mi mem ne estis aparte entuziasma. Esperanto – aventuro? Lingvo, kies substantivoj ĉiuj finiĝas per -o, ankaŭ la inaj? Tio kontraŭsente efikis sur min. Sed la praktika valoro, la amikoj en la tuta mondo, kiujn oni akiras per ĝi, ĝia kapablo kunligi popolojn? Esperanto ne volas premi flanken ies gepatran lingvon, ĝi unuigu kiel dua lingvo ĉiujn homojn – aŭ iel simile.”

Post tiuj ĉi iom svagaj konsideroj abrupte komenciĝas la artisma rakonto.

RÖSSLER Franz-Georg



Artmann: arta viro, ne nur laŭnome.

DISKOJ

Brue sed neskandale

La invitmesaĝo de MONATO intrige tekstis: „... Ĝi estas ekstrema produktaĵo tute subgrunda kun prezento de ege brumuzikaj bandoj (anarkipunkaj, hardkoraj kaj traŝaj), vera bombo en spio! Konvenciaj esperantistoj abononos ĝin kaj ili skandaliĝos. Plej gravaj kritikoj estos: ... - kio kompreneblas estas maldeca kaj malmorala”¹. Ĉu iu sukcesus elteni kaj ne mendi ĉi diskon? Mi ne sukcesis, kaj senpacience atendis la alvenon de la disko. Kaj kiam ĝi alvenis, mi estis tre seniluziigita.

Ĉar ĝi estis la absolute ordinara KD de la tute ordinaraj bruaj bandoj, kiuj estas amase aŭskulteblaj en rokvendejoj de ajna lando. Do, ne troveblas io vere skandaliga. Sed pri kio MONATO pravis, estas, ke la vortoj estas malofte kompreneblaj, kaj tio eĉ pli seninteresiĝas la diskon, ĉar, se oni almenaŭ povus aŭdi la tekstojn ...

Entute estas prezentitaj 15 rokbandoj kaj 31 kantoj. Ĉio estas ludata en la sama stilo: mi difinas ĝin kiel simplan hard-rok; ĉar kutime la stiloj diferenciĝas ne tiom per muziko (gitaroj kaj drumoj ĉie estas la samaj), sed per la teksto, kaj pri la ĉi-diskaj tekstoj oni jam menciis.

Neniu el la bandoj estas vaste konata. Konstantaj legantoj de Rok-gazet’ povas rekoni kelkajn band-titolojn (*Piĉismo*), sed certe oni apenaŭ iam havis la veran eblecon aŭdi la bandojn. Do jen la bona ebleco! Grigori AROSEV

Esperanto Subgrunde Kompil’ Eld. Vinilkosmo, Donneville, 2000. Kompakta disko, 66,12 minutoj. Prezo ĉe FEL: 18,00 EUR + afranko.

1. La citita teksto tamen ne venas de MONATO, sed de la disko-eldonejo.

Per ardua ad astra (Tra krutaĵoj al la astroj)

En novembro 1994, irlanda astronomia revuo *Réalta* publikigis artikoleon mian, al kiu mi aldonis relative longan liston da fakdelegitoj pri astronomio, kiun mi trovis en la tiujara Jarlibro de UEA. Samtempe, en alia loko, mi esprimis miron, ke, malgraŭ tiu evidenta indiko de intereso pri astronomio inter ne malmulte da esperantistoj, estas neniu astronomia societo inter la fakaj asocioj listigitaj en la sama Jarlibro.

Feliĉe, en la lastaj jaroj, tiu manko estis plurmaniere kompensita kaj korektita. Amri Wandel, astronomo kaj esperantisto, jam plurfoje prelegis pri sia fako kadre de la Internacia Kongresa Universitato en diversaj lokoj. Mi kaj mia edzino, prezidantino de nia amatora astronomia societo, ĝuis liajn prelegojn en Montpeliero kaj Berlino. Mi bedaŭris, ke ni ne estis ankaŭ en Tel-Avivo por aŭskulti lian tiean kontribuon.

Plie, estis raportite, ke Patrick Lagrange gvidis kurson pri astronomio en La Kvinpetalo, Bouresse. Alia evolua etapo en la historio de astronomio en Esperantujo estis atingita en 2000, kiam Alex Mikishev fondis AEK (Astronomia Esperanto-Klubo). Do, ŝajnas, ke astronomio finfine ricevis sian meritatan lokon en Esperantujo.

Nun, aperis verko, kiu, laŭ aserto de Wandel en ĝia enkonduko „...estas verŝajne la unua universitatnivela libro kaj kurso de astronomio en Esperanto.” Eĉ tiuj, kiuj ne speciale interesiĝas pri astronomio, devus bonvenigi ĝian aperon, ĉar la kvanto de seriozaj sciencaj verkoj en Esperanto estas lamentinde malgranda.

La recenzata libro estas dividita en du partojn: Astronomia (David Galadí-Enríquez); kaj Astrofizika (Amri Wandel). En la unua, la leganto ricevas koncizan bazan kurson pri elementa astronomio, kio liveras bonan fundamenton por sekvi la postajn ĉapitrojn, kiuj prezentas mallongan enkondukon al la fascina sed komplika astrofizika scienco. Ĉio estas simple kaj klare eksplikita, kaj per la teksto, kaj per diagramoj kaj ilustraĵoj. Kompreneble, malgrandaj desegnaĵoj ne povas doni pli ol tre proksimuman ideon pri (ekzemple) la proporcioj de la planedaj orbitoj. „En



neniu farebla desegnaĵo ni povas desegni samtempe la orbitojn kaj la planedojn laŭ la sama skalo” (p. 34). Kun tia limigo, la ilustraĵoj estas sufiĉe helpemaj kaj klarigas plurajn malfacilaĵojn.

Kio estas la tasko de astronomo? Galadí-Enríquez skribas: „Astronomio serĉas kaj donas respondon al du fundamentaj demandoj: *kio kaj kie* ni estas”. Pro tio li komencas komparante la grandecon de la homo kun tiu de lia ĉirkaŭaĵo, poste de la lando, la tero, la luno... De tie li pasas al la dimensioj de la planedoj de nia sunsistemo, la interstela grandeco, kaj laste, al la kolosaj skaloj de la galaksioj kaj intergalaksia spaco. Li klarigas kiel la homo unue sukcesis mezuri la teron, kaj progresis al mezurado de nia sunsistemo.

Li diskutas pri la planedaj orbitoj, la leĝo de Kepler kaj planedaj moviĝoj. Por tio li uzas kaj difinas en facile komprenebla lingvaĵo kelkajn el la esencaj klasikaj astronomiaj terminoj: elongacio, konjunkcio, kvadrato, deklinacio, ascensio, ktp. Tio kondukas nin al studado de la tempaj konceptoj: jaroj, monatoj, tagoj, tajdoj, kaj de la astroj senpere plej gravaj por ni, nome la suno kaj la luno. Revenante al la temo de la tero, li klarigas rotacion, la signifon de la malkovro de Foucault, la translacion, la oblikvecon de la ekliptiko, ktp.

La aŭtoro tiam prezentas al la leganto la korpojn, kiuj rondiras nian sunon, ĝiajn dimensiojn kaj naturon. Li eliras de la sunsistemo en la vastan firmamenton, klarigas la koordinatojn:

altitudon kaj azimuton kaj listigas la nomojn de steloj kaj konstelacioj. (Mi iam miris, ke en la tabelo de la greka alfabeto li uzas la strangajn formojn *epsila*, *omikra*, *upsila* anstataŭ la ĝustajn *epsilon*, *omikron*, *upsilon*.)

En la ĉapitro 6 („La steloj”) ni lernas pri magnitudo, parsekoj, la signifo de la koloroj kaj ĝia rilato al surfaca temperaturo, pri spektraj tipoj de steloj kaj pri klasifiko de steloj laŭ grandeco. De tie ni antaŭeniras al pli kompleksaj temoj: stelevoluo, origino de la elementoj, klasifiko de la steloj. La aŭtoro mencias la variajn stelojn, sed ne la utilon de la Cefeidoj por decidi la grandecon kaj strukturon de nia galaksio kaj la distancon al proksimaj galaksioj. Tamen, li ja eksplikas, kiel per trigonometrio oni povas mezuri la distancojn al stelo. En tiu kunteksto li klarigas ankaŭ, kiel uzi la stelan paralakson.

Sekvaj ĉapitroj parolas pri la Profunda Ĉielo: stelamasoj, nebulozoj kaj klasifiko de galaksiaj tipoj; teleskopoj: optiko kaj mekaniko, objektivoj, celado kaj uzado, ktp; la Kosmo: ĝia strukturo, la paradokso de Olbers, la ekspansio de la universo, ruĝenŝovo, kosma ekspansio, aĝo kaj historio - kaj, finfine la estonteco de la Kosmo.

Tiu unua parto de la verko estas bona kaj praktika enkonduko al la astrofizika parto verkita de Amri Wandel. Iu ajn, kiu ĉeestis prelegojn de tiu astronomo, aprezos, kiom klare kaj interese li prezentas sian materialon. Eĉ la ekvacioj, kiujn studentoj kaj amatoroj trovas timigaj kaj nekompreneblaj, estas lerte klarigitaj. En ĉi tiuj ĉapitroj, Wandel pli detale disvolvas la temojn mallonge prezentitajn de Galadí-Enríquez.

Li plie enkondukas la leganton al la mensebriiga perspektivo de la ekstergalaksia astrofiziko kaj prezentas kelkajn el la plej profundaj enigmoj de la universo. La lastaj ĉapitroj estas dediĉitaj al la fascinea demando: „Ĉu ni estas solaj?” kaj al la temoj „Vivo ekster la Tero” kaj „Serĉado de Ekstertera Inteligenteco” (SETI). Kiam li pridiskutas la temon „Komunikado kun Ekstertera Civilizacio”, oni povus havi la impreson, ke temas pli pri sciencfikcio ol pri scienco. Tiu sekcio estas laŭvorte la teksto de la prelego, kiun Wandel prezentis kadre de la montpeliera Internacia Kongresa Universitato. Pri la SETI-programo, Wandel citas vortojn de iu SETI-pioniro, „Mi ne scias, kiom granda estas la ŝanco trovi eksterterajn civilizaciojn, sed se ni ne serĉos, la ŝanco estas nulo.”

Skribante pri la ebla ekzisto de vivo

Romano el la flandra literaturo

En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historia periodo, tiu de la Nazaretano. Tiel, li reduktas siajn spertojn al simbola rakonto, transportante vivon kaj strebadon de individuo al nivelo universala. Li donas al sia rakonto filozofian substraton kaj en tiu maniero levas ĝin al tuthomara realeco.

La migranta judo



Paĝoj: 72; ilustrita; 21 cm; vinktita;
Prezo: **11,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de **FEL**

Lerni la japanan per Esperanto

Kun granda aprobo mi vidis la aperon de tiu ĉi libro: estu pli da tiaj libroj en (ja propedeŭtika) lingvo Esperanto. Tiom pli mi ĝojis, ĉar mi mem vivis en Japanio; do tiu ĉi libro povis helpi min refreŝigi la lernitaĵojn.

Tamen, jam en la unua leciono min trafis iu strangaĵo, nome la eldiro: „La japana havas 19 literojn.” Mi lernis, ke la japana lingvo konsistas el silaboj (pli ĝuste, moraoj, kiel prave lerneblas en la libro), ne el literoj. Literoj aperas, nur kiam oni transskribas la lingvon por eksterlandanoj. Kaj la nombro de tiuj literoj dependas ne de la lingvo, sed de la transskribmaniero. Tiu maniero, kiun la aŭtoro favoras, efektive konsistas el 19 literoj; sed alia, ankaŭ disvastigita maniero, uzas 21 literojn kaj aspektas sufiĉe alie: komparu ekzemple „Mitubisi” kaj „Mitsubishi”, aŭ „Tyûgoku” kaj „Chûgoku”. Estas ja konfuze.

La libro mem aspektas tre bone, kiel ni kutimas pri libroj de *Fonto*, sed mi tre ege bedaŭras, ke en lernolibro pri la japana lingvo, oni trovas eĉ ne unu japanan signon: neniu kanao aŭ ideogramo aperas en la tuta libro. Kun la nuna tekniko, mi ne povas imagi, ke tio okazigus problemon!

Tre praktika estas la dudirekta vortaro ĉe la fino de la libro, kaj tre interesaj estas la notoj pri la japana kulturo, kiuj variigas kaj senpezigas la lecionojn. Ĉar pezaj ili ja estas por tiuj, kiuj ne estas diplomitaj gramatikistoj. Mi dubas, ĉu la granda publiko komprenos klarigojn, kiel ekzemple „... konservas forte la deiktikan karakteron, kaj ne sufiĉe la anaforan.”

Mi dirus: se vi ne komprenas la vortojn „perifrazo”, „aoristo”, „semiotika” aŭ „enklitiko”, unue studu lingvistikon. (Ankaŭ PIV ne konas ĉiujn ĉi vortojn, nek PAG.)

Kaj kial aperas tiom da specialistaj gramatikaj terminoj, se en unusola paĝo (numero 39) mi trovis du fuŝojn rilate la sufiĉe simplan Esperanto-gramatikon („... pri ĉiu nova verbo, kiun li renkontiĝas” kaj „... fariĝas enklitikon”), estas al mi enigmo!

Konklude, por gramatikistoj la libro estas vera frandaĵo: ili trovos ankaŭ referencojn al – kaj komparojn en – deko da aliaj lingvoj; sed por turisto, kiu intencas viziti Japanion, mi konsilas uzi alian lernolibron. La aŭtoro estas certe erudita, sed lia katedro estas tro alta. Bonan instruiston ne karakterizas la komplikeco, sed ja la klareco de liaj vortoj!

Lode VAN DE VELDE

Yamasaki Seikô: *Enkonduko en la japanan*. Eld. Fonto, Chapecó, 2000. 180 paĝoj glue binditaj. Prezo ĉe FEL: 14,20 EUR + afranko.



aliloke en la kosmo, Wandel sugestas: „... kunligi nian konon de la universo en astronomia skalo kun nia bildo pri la evoluo de vivo sur la tero povas gvidi nin al la konkludo, ke samkiel nia loko en la universo ne estas speciala, ankaŭ la ekzisto de vivo sur nia planedo ne estas eksterordinara fenomeno, en la skalo de la tuta universo.”

Persone, mi tre ĝojas pri la apero de ĉi tiu verko. Dum longa tempo mi deziris allogi pli da personoj, kaj en la lando, kie mi loĝas kaj en Esperantujo, al Astronomio, kiun en prelego en astronomia societo mi iam nomis „La scienco de Ĉio”. Ĝis nun, ŝajnas, ke la nombro da interesatoj restas malgranda, kvankam fidela. Por ni, ŝatantoj de ĉiela observado kaj studado (kvankam nuraj amatoroj), estas malfacile kompre-

ni, kial ne estas pli granda la nombro da entuziasmoj pri astronomio kaj kosmologio. Kiel parton de niaj klopodoj interesigi la grandan plimulton, mi iam sendis al konata revuo en Esperanto raporton pri unu el la plej gravaj kaj ĝuindaj astronomiaj festivaloj en mia lando. La redaktoro de la koncerna rubriko malakceptis ĝin, asertante, ke la revuo ne publikigas tiajn „sciencfaĵojn”. Vere, ni vojaĝas *Tra krutaĵoj al la astroj*, sed ĉi tiu verko helpas glatigi la grimpadon. Garbhan MacAOIDH

David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel: *La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo. Elementa kurso pri astronomio*. Eld. Fundación Esperanto kaj Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2001. 199 paĝoj kudre binditaj. ISBN 90 71205 92 4. Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko.

Venas proverbo el popola la cerbo

Ĉu realiĝis revo? La patro de Zamenhof, Marko, estis pretiginta frazeologion de interrespondaj dirmanieroj kaj proverboj en la lingvoj rusa, pola, franca, germana. Tia ĝi komencis aperi pokajere en 1905. Post la dua kajero ekaldoniĝis la esperanta fare de Ludoviko, kaj estis planita ankaŭ komparo kun la latina kaj la hebrea. Tiu ambicia eldona plano haltis pro la morto de Marko Zamenhof, kiu ja havis la tekston preta; en atendo de pli bonaj eldonoj (kiuj venis neniam plu) estis tamen pluflegata la esperanta parto, kaj ĝi sola atingis eldonon kompletan, antaŭe popartan en *La Revuo*, poste kolektitan en libro, eldonita ĉe Hachette en 1910, sub la titolo *Proverbaro Esperanta*. Pionira laboro, antaŭ jarcento; nun en diversaj lingvoj ekzistas nemalmultaj el ĉi kompilaĵoj; sed neniu ĝis nun estis enpreninta esperantan parton, el kiu, en la plej bona el la okazoj, ĉerpis kompilintoj de vortaroj de naciaj lingvoj al Esperanto.

Nun ĉefredaktoro Lucien Bourgeois [lusjén burĝuá], helpate de sep aliaj kunlaborantoj, respuras tiun revon de Marko Zamenhof kaj proponas al ni kajeron de 482 proverboj inter si respondaj en la lingvoj franca-angla-germana-esperanta. La kvanto povas ŝajni modesta, se komparata al la 2630 frazoj de la zamenhofa proverbaro, kiu tamen entenis ankaŭ plurajn ripetadojn kaj multajn simplajn dirmanierojn.

En la kompilaĵo nur iom pli ol duono rilatas al la proverbaro zamenhofa; la cetero venas kiel novaj proponoj laŭ ideoj de la aŭtoro aŭ spikumataj inter la postzamenhofa verkaro. La ĉerpoj el Zamenhof estas tute oportunaj, kaj ankaŭ la novaj proponoj taŭge sin lokas en la tradicio: esprimoj sintezaj, ofte kun rimoj. Bonega estas „Hodiaŭ forto, morgaŭ morto” por la germana *Heute rot, morgen tot*, responda al la franca *Aujourd'hui en chair, demain en bière*; aŭ „Sen espero, for la vivo” por la germana *Hoffnung verloren - alles verloren* kaj angla *To hope is to live*. Kelkfoje oni povas proponi anstataŭan: en la loko de „Ĉiu vento blovas profiton al iu” eble preferindus „Nur vento malbona al neniu ion donas”. Perfekta „Nobelego devontigas” (aŭ eĉ nur „devigas”) por *Noblesse oblige*, uzata ankaŭ en la angla (kaj en la itala); aŭ „Mono militon nutras” por *L'argent est le nerf de la guerre*.

Se do la plimulton de la kompilaĵo oni plene laŭdu, oni povus bedaŭri, ke ne ĉiam en la diversaj lingvoj estas elektataj la plej proksimumaj

ekvivalentoj. Atenta esploranto notus, ke ofte similas inter si la franca kaj la germana, dum la angla estas pli fora aŭ preskaŭ pene tradukita. Interese estas vidi, ke L.L. Zamenhof estis kutime pli fidela al la germana formo, kaj unu ekzemplo sufiĉu: *La barbe ne fait pas le philosophe, It is not the beard that makes the philosopher* (kaj la itala dirus *La barba non fa il filosofo*) en la germana sonas: *Ein weisser Bart zügt nicht für Weisheit*, kio estas paŭsita en

Esperanto „Griza barbo saĝon ne atestas”. La novaj proponoj de Bourgeois estas ekvilibraj, eble kun ioma prefero por la franclingva nuanco.

Laŭ la ekstera aspekto kaj laŭ la filologia vidpunkto sin trudas tamen riproĉoj. Nenia klarigo, postnoto, helpa komento, indekso: la sinsekvo estas laŭ la alfabeto ordo de la ĉefvorto en la franca, tiel ke similaj konceptoj estas dise en la verko. Sed tio ne ĉiam: *La barbe...* estas sub „B”, *Il y a* ĉiam sub „I”. La ordo laŭ la ĉefvorto de la gvida lingvo normalas ĉe proverbaroj, sed ja kutime estas kunigaj posttabeloj

Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko
<http://retbutiko.esperanto.be>

1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel
La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR

2 K.J.K. Vroegop
Johano Prezo: 7,50 EUR

3 Anna Löwenstein
dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

4 August Vermeylen
La migranta judo Prezo: 8,00 EUR

5 Lena Kapunina
La bato Prezo: 12,00 EUR

6 Pasporto al la tuta mondo
(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR

7 Peter J. Tomson
La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

8 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck
Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR

9 Maria Becker-Meisberger
dua eldono Internacie kuiru Prezo: 10,00 EUR

10 Phil Bosmans
Donace al vi Prezo: 7,00 EUR



Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Fakse: + 32 3 233 54 33

Kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj?



Pri tio ekzistas du respondoj, unu pozitiva kaj unu negativa. La pozitiva estas, ke Jesuo kaj liaj unuaj adeptoj estis kaj restis Judoj. Tial la komencon de la Kristanismo ni devas kompreni el la Judismo. La negativa respondo estas, ke poste la Kristanoj sin apartigis kaj ekrigardis la Judojn kiel malamikojn. Ili opiniis eĉ ke tio estis la intenco de Jesuo. De tiam esti Kristano ŝajnis egali kontraŭ-Judismon. Pro ĉi-ambaŭ kialoj ni ne povas preparoli Jesuon aparte de la Judoj.

Paĝoj: 158; ilustrita; 21 cm; kudre bindita; Prezo: **11,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

aŭ temaj indeksoj: ĉi tie nenio. Estas indikoj, ĉu io venas de Zamenhof, aŭ de la Nova Testamento, sed kelkfoje la indikoj estas neĝustaj, aŭ mankas entute: „Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro...”, aŭ „Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito” venas el la Evangelio, sed tio ne estas indikita Aliaj formoj estas klasitaj kiel zamenhofaj, sed mankas en la *Proverbaro* (ĉu ili devenas el postaj verkoj?). Iuj formoj klasitaj per „Z” estas tamen aliigitaj: „Brogita eĉ sur akvon blovas” ricevis la ne ja maltaŭgan, tamen neaŭtentikan aldono „malvarman”. Laŭdinda estas la iniciato indiki la zamenhofajn proverbojn, eĉ kiam ili estas pezaj kaj jam antikviĝintaj, kiel „Ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava”; sed pli laŭdinde estus kuraĝe proponi, apude, novan, kiel „El fajrero, fajrego” aŭ „Kaŭzo eta, granda sekvo”.

Ne ĉiam ĉiu konsentus pri la elekto de la korespondaj signifoj aŭ nuancoj. La du esprimoj „Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito”, kaj „Kiu saĝon ne havas, Dio lin savas” ne estas ekvivalentaj, kaj tamen ili estas proponitaj por samnancaj francaj frazoj. Same „Kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas” ne estas tre taŭga redono de *On prends plus*

de mouches avec du miel qu'avec du vinaigre (= oni kaptas pli da muŝoj per mielo ol per vinagro). Ofte por la angla, malpli ofte por la germana, estas montrataj diversaj ekvivalentaj esprimoj; bedaŭrinde en Esperanto ĉiam nur unu, kvankam ekzistus pluraj similaj. En nur kelkaj okazoj la angla aŭ la germana traduko forestas entute.

Harfenduloj povus rimarki, ke krom la zamenhofaj firmiĝis ankaŭ multaj aliaj proverboj, kaj valorus pluteni ilin, anstataŭ krei novajn: „Por vino bona ŝildo ne bezona” jam troviĝas antaŭ duonjarcento, ne pervaloras enkonduki la similan „Vino bona ŝildon ne bezonas”. Sed finfine temas pri etaĵoj: la popola saĝo estas tiom vasta kaj tiom diversesperma, ke elekto de unu nuanco aŭ alia estas afero de gusto. Frandu tiun de ĉi kajero; espereble ĝi donos al la leganto la emon spuri pliajn proverbojn kaj alproksimiĝi al tiom ĉarmaj diverslingvaj esprimoj, tra kiuj transdoniĝas tra la generacioj la saĝo de la homaro.

Carlo MINNAJA

Lucien Bourgeois: *Kvarlingva (franca-angla-germana-esperanta) Proverbaro*. Eld. La KancerKlinikoteko, 2000. 26 paĝoj. Prezo ĉe FEL: 5,00 eŭroj + afranko.

Ĉu amnoveletoj?

La libro konsistas el tri noveloj. Ĉu ili estas amnoveletoj?

Anton Ĉeĥov *Pri la amo*: Tiu ĉi malgranda novelo ne apartenas al tiaj verkoj, kies legadon oni ne povus iam ajn ĉesigi. Post la finlego, oni ne povas rakonti, pri kio oni legis. Oni trovas nek eventojn, nek grandajn pensojn, eĉ kaŝitajn inter la linioj. Unuopaj frazoj estas bonaj, kaj ties traduko estas bona, facile legebla. Ankaŭ iuj nuntempaj, aprecataj verkistoj klopodas skribi bele, sed diri nenion.

Ivan Bunin *Rusja*: Dum trajnoveturo viro rememoras pri iama bela somera evento, kiu okazis en tiu regiono. Amo al knabino, kies patrino malhelpis daŭrigon de la rilato inter ili. Delikata priskribo de mallonga, granda anima kaj korpa amo, kaj de la sentoj, kiujn ĝi vekis en la viro post dudek jaroj.


Vladimir Nabokov *Muziko*: Trifoje zorge mi finstudis tiun ĉi mallongan novelon, por kompreni, pri kio temas. Mi trovis nenion. Eble pensoj, kiuj kirligis en viro dum aŭskulto de muziko.

La unuan kaj lastan novelojn certe mi ne finlegus, se mi ne devintus skribi recenzon pri ili.

Cetere, la laboron de la eldonejo *Sezonoj* mi opinias valora: ĝi volas kontentigi legantojn, havantajn diversajn gustojn.

János SÁRKÖZI

A. Ĉeĥov, I. Bunin, V. Nabokov: *Rusaj amnoveletoj*. El la rusa tradukis G. Arosev, A. Korĵenkov. Eld. Sezonoj, Jekaterinburg, 2000. 24 paĝoj. (Serio Rusa literaturo. Volumo 7.) Prezo ĉe FEL: 2,20 EUR + afranko.



Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: maul@newsfactory.net

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidélíusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Korektanto: Izabel C. Oliveira Santiago.

Grafiko: Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



MONATO - redaktoroj

Arto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando. Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ekonomio: Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio. Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!) Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

El mia vidpunkto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: maul@newsfactory.net

Enigmoj: Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio. Reta adreso: jp@fel.esperanto.be Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

Eseoj: Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

Hobio: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Komputado: Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL. Reta adreso: edmund@rano.org

Leteroj: Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reta adreso: guido@fel.esperanto.be

Libroj: Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono. Reta adreso: kolker@stratos.net Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

Noto: Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

Lingvo: YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

Medio: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: haot@freemail.hu

Moderna vivo: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Noveloj kaj Poezio: Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo. Reta adreso: mattos@super.com.br

Politiko: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Scienco: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: haot@freemail.hu

Spirita vivo: Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando. Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

Ŝerco kaj satiro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: maul@newsfactory.net Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

Turismo: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

Vila hundo

Vilĉjo vizitis drinkejon en nekonata parto de la urbo. Li konversaciis kun laboristo, kiu havis sufiĉe neallogan hundon.

„Ĝi ne imponas per la eksteriĝo, sed vi devus aŭskulti ĝin, kiam ĝi deklamas!”

Vilĉjo ridis: „Ne diru al mi tion! Hundoj ne povas paroli.”

La laboristo sin turnis al la hundo: „Rover, deklamu!” Kaj la hundo bele deklamis la tutan paroladon de Hamleto: „Estu aŭ ne estu...”

Vilĉjo miregis. „Mi deziras havi tiun hundon.”

„Ho”, respondis la laboristo, „tio estas nenio. Vi devus aŭdi ĝin kanti. Rover, kantu!” Kaj Rover tuj kantis la preferatan „Esperanto, bela Esperanto...”

Vilĉjo estis tre ekscitita. „Kiom kostas la hundo? Treege plaĉus al mi posedi ĝin.” Kaj li volonte pagis cent pundojn por la hundo, kaj ĝoje hejmeniris.

La postan vesperon Vilĉjo vizitis kun Rover sian kutiman trinkejon *La Verda Stelo*. „Kie vi trovis tiun miksrasan hundon?” la amikoj demandis.

„Estas negrave pri ĝia aspekto”, diris Vilĉjo, „tiu ĉi hundo bonege deklamas.” La drinkantoj ridegis.

Do, kiu vetos pri la afero?” demandis Vilĉjo, preta gajni grandan profiton. La tuta kompanio tuj vetis kontraŭ la hundo, kaj Vilĉjo rigardis la monbiletojn kaj kalkulis, ke li povus gajni la prezon de la hundo per unu demonstro.

„Nu, Rover, deklamu!” li diris. Sed Rover nur rigardis sian novan posedanton kaj svingis la voston.

Kaj ĉiuj viroj denove ridegis kaj kolektis la gajnaĵon. Vilĉjo ekkoleris, sed kriegis: „Nu, atendu ĝis la kantado. Rover ankaŭ kantas.”

La patronoj de *La Verda Stelo* treege amuziĝis per la nova pretendo de Vilĉjo, kaj ili vetis pli da mono. „Nu, Rover, aŭskultu! Kantu, mi petas”, postulis Vilĉjo. „Kantu, kiel vi kantis pasintan vesperon”, petegis Vilĉjo. Sed, bedaŭrinde, Rover nur svingis la voston.


Nun Vilĉjo estis senmona kaj ege kolera. Li eliris kaj trenis la hundon hejmen. Tie li akriĝis grandan tranĉilon. „Kion vi faras?” demandis Rover.

„Mi tranĉos vian gorĝon; mi perdis pro vi grandan sumon da mono!”

Rover respondis: „Ne estu stultulo! Pripensu la vetŝancojn, kiuj atendas nin morgaŭ en *La Verda Stelo*!”

Vilĉjo SIMCOCK

DISK*RETA



Ŝercoj

La direktoro riproĉas: „Min mirigas via malrapideco en la laboro. Ĉu vi ion faras rapide?”
„Certe jes! Mi rapide laciĝas.”

*

Kuracisto al paciento: „Ne tiom drinku! Viaj sangogutoj forvaporigis antaŭ ol atingi la laboratorion.”

*

Juĝisto al drinkulo: „Vi estas venigita tien ĉi pro la drinkado.”
La akuzito: „Ni drinku do!”

*

La infanoj post la lerneja tago venas hejmen kaj tie trovas nenium. Sed la knabino diras al sia frateto: „Panjo ne estas malproksime, la telefono ankoraŭ varmas.”

*

„Kion mi donacu al Lisa en ŝia naskiĝtaga datreveno? Mi delonge cerbumas senrezulte.”

„Kial vi ne demandas al Lisa mem, kion ŝi deziras?”

„Por tio mia mono ne sufiĉas!”

*

Sur la dorso de la ledjako de motorciklisto mi legis tiun ĉi tekston: „Se vi vidas ĉi tion, mia amikino falis de sur la selo.”

Saliko

Rusto

Post libertempo, sur la strato renkontas min bona konato.

*„Vi estas ja belege bruna, feriis do certe en lando suna”, supozas li pro haŭta pruvo.
„Ho jes, sed jen estis nur pluvo anstataŭ la varma sunbrilo”, replikas mi en grumbla stilo.
„Mirinde! Kial bruniĝis vi do tiele tamen?” kun sciavido demandas li pri tia malĝusto.
Klarigas mi: „Efikis ĝin rusto.”*

stef

— anoncetoj —

Por prezenti Esperanton dum urba forumo, la 29/09/01, nia grupo ŝatus ricevi bildkartojn kun salutvortoj el plej diversaj landoj. Antaŭdankon. Jean-Yves SANTERRE, Duret, 44410 HERBIGNAC, Francio.

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

Naturista Vivo, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fő u. 41/5 HU-8531, rete: jozefo@nl-papa.hu.

Internaciisto: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provkempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

ESPERANTO



Eventoj

aperas dusemajne

pk. 87. Budapest,
H-1675, Hungario
Telefono kaj fakso:
+36-1-2828885
eventoj@hungary.net

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.

Petu provkempleron de:

Eventoj

Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario

Rete: eventoj@esperanto.org



Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Iun tagon, Bruno kaj Maryvonne Robineau forlasis sian farmon en Francio por migri ĉirkaŭ la mondo dum ok jaroj, por iri renkonten al la homoj, dividante ilian laboron kaj ilian ĉitutagan vivon.

Ili rikoltas lentojn en hinda vilaĝo, iniciĝas al la ceremonio en Japanio, partoprenas geedziĝfeston en kanaka tribo de Nov-Kaledonio kaj spertas mortminacon en Gvatemalio.

La zamenhofa lingvo malfermis al ili la intimecon de multaj familioj. Bela homkolektado ekde ĉina kamparano ĝis bulgara oficiro, tra hungara instruisto aŭ japana kadrulo.

Fascina verko, kiu spiras kortuŝan homaramon kaj homecon.

(G. MacAoidh en Monato)

Ili vivis sur la tero. 1998. Mendebila ĉe FEL kontraŭ 17,87 € + afranko.

Enkonduko de la eŭro

Atentu! Ĉu vi ankoraŭ havas frankojn, markojn, ŝilingojn, pesetojn, lirojn, guldenojn, eskudojn aŭ irlandajn pundojn?

Kiel vi verŝajne scias, en la 1a de januaro de la jaro 2002 ĉiuj belgaj, francaj kaj luksemburgaj frankoj, germanaj kaj finnaj markoj, aŭstraj ŝilingoj, hispanaj pesetoj, italaj liroj, nederlandaj guldenoj, portugalaĵoj eskudoj kaj irlandaj pundoj iĝos senvaloraj. Finiĝos en tiu momento la transira periodo dum kiu tiuj monunuoj ankoraŭ estis validaj, kaj validos anstataŭe nur la eŭro.

Ĉu vi ankoraŭ posedas tiajn biletojn de iama vojaĝo aŭ kongreso? Estus domaĝe perdi ilin! Por ke tio ne okazu, Flandra Esperanto-Ligo proponas al vi senpagan interŝanĝon al eŭroj laŭ la oficiala kurzo.

Kion vi faru? Kolektu la cititajn monbiletojn kaj sendu ilin en bone fermita koverto, eventuale registrite, al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Vi povas ankaŭ transdoni ilin al oficisto de FEL en la MONATO-budo dum la Universala Kongreso en Zagrebo, aŭ en la FEL-libroservo dum la Internacia Festivalo en Germanio (decembro 2001). FEL senpage konvertos la biletojn al eŭroj kaj aldonos tiun sumon al via FEL-konto (se vi ankoraŭ ne havas FEL-konton, oni volonte senpage kreos ĝin por vi). La eŭrojn en via konto vi povos uzi kiel kutime por aĉeti librojn, por plilongigi vian abonon al MONATO, aboni al aliaj revuoj, pagi kongresojn, ktp.

Se restus iuj demandoj aŭ malklaraĵoj, ne hezitu skribi al nia financa konsilisto: financo@fel.esperanto.be aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

Kiel funkcias?




Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi rricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen
tlf. +32 3 234 34 00
tlk. +32 3 233 54 33
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>



Stafeto
librorondo

